# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 04/11/2021 Kvincentkvindekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu** *Google Translate* **kiel vortaron**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 810,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **282,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **225,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **196,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **107,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde marto 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

*Roger Springer*

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



**La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5- minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.**




Esperanta Retradio
Ligna tranĉilo akra kiel el ŝtalo 28/10/2021

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAÎOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 59 de "Por Komencantoj".




GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). La komplementoj al vortoj havas tri formojn: aŭ ĝi estas sola vorto, aŭ prepozitivo, aŭ suborda frazo. Ĉiuj komplementoj aldonas ekstran signifon al la determinata(j) vorto(j).

La unua speco de komplemento nomiĝas "epiteto". Ĝi normale, sed ne necese, staras en Esperanto kaj la angla antaŭ sia determinato, kiu plej ofte estas substantivo.

La epiteto tiukaze estas adjektivo. Malpli uzata estas adjektiva determinato kun adverba epiteto. Ni ne inkluzivigas la adverbajn epitetojn ĉe la verboj, ĉar tiuj jam estas kalkulitaj kiel adjektoj, la kvara parto de la propozicio.

Demandoj: A). Ĉu ekzistas ankaŭ adverbaj epitetoj ĉe adverbaj determinatoj?

B). Ĉu adjektiva epiteto ricevas, se necese, la pluralon aŭ/kaj la akuzativon?

2). La lingvo kelkfoje subkomprenas la determinaton: "Mi havas tri hundojn, kaj la plej JUNA (HUNDO) nomiĝas "Kapi".

La lingvo kelkfoje uzas verbon kun predikativo, kiel en "La prunoj estas KUIRITAJ" kaj "Ni manĝas la prunojn (kiel) KUIRITAJ"

Demandoj: A). Ĉu ambaŭ aŭ unu aŭ neniu el la vortoj "kuiritaj" estas epitetoj?

B). Ĉu epiteto en unu frazparto povas normale difini determinaton en alia frazparto?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 555.

*Marcel Leereveld.*

**Artikoloj por AE**. Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, uzu la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendu ĝin rekte al AE rogerspringer@tpg.com.au;

## Mi serĉis la interreton por kontraŭ militaj Aŭstraliaj politikaj partioj.

*Australian Citizens Party* *View Email in Browser (enudgemail.com.au)*

Ankaŭ *the Socialist Equality Party, SEP* La nunaj politikistoj nur helpas Usonajn militojn.

*Roger Springer*



# La Manlia Esperanto-Klubo



## Rekomencas siajn kunvenojn

La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.

Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.

La 6a de novembro estos la unua sabato. Ĉiuj bonvenaj. *Roger Springer*

# Reago al la artikolo de Marcel en AE 554

Malaperigi la koronaviruson per vakcinado ŝajnas al mi ne tiom simpla kiom Marcel priskribas. La naturo estas tia ke ne ekzistas “La Solvo” tute kontentiga . Ordigi, kategoriigi, etikedigi ĉiam montras kiom malfacile estas enigi ĉiujn elementojn en unu kategorion, sub unu etikedon. Plejparto de la lingvoj havas siajn esceptojn, ne nur pro historiaj kialoj. Eĉ Esperanto , kiu estas pli logika ol multaj aliaj lingvoj havas siajn malglataĵojn .

Kiam mi vivis en Alĝerio ofte okazis epidemio de ĥolero en la somero. Sed ne ie ajn . En la ladurboj kie la higieno ne havis altan nivelon. Laŭ mia kono ankoraŭ ne estas vakcino kontraŭ la pesto. Estas la konstruado de efika kloaksistemo, kiu ebligis la malaperon de tiu malsano en Aŭstralio. La gripo ( influenco) revenas ĉiun vintron kaj la fakuloj kiuj preparas la jaran vakcinon ne certas ĉu ĝi estos efika kontraŭ la varianto de ĉi tiu jara gripo.

Estas sciate unuflanke ke la proksimeco de bestoj kaj homoj kaŭzas tiun fenomenon de zoonozo kaj koronaviruso verŝajne apartenas al tiu kategorio. Ĉu unu solvo estus ne plu bredi bestojn en grandaj kvantoj ? Kelkaj eĉ proponas ke ni ĉiuj fariĝu se ne veganoj, almenaŭ vegetaranoj . Aliflanke la grandaj konstruaĵoj sen fenestroj ne permesas taŭgan cirkuladon de la aero , kio ĝuste estas la rimedo por disvastigi la viruson. Je la momento oni instalas aerpurigilojn ĉie . Sed ĉu oni devas pensi pri ŝanĝo en la maniero en kiu oni konstruas la domojn?

Surprizas min ke Marcel opinias necesa insulti homojn, kiuj malsame agas “ *la granda plimulto estas multe malpli inteligenta ol la antaŭaj generacioj. “*

*“En Viktorio kelkaj homoj ĝuste komprenas la situacion kaj la danĝerojn, kiel la viktoria registaro, sed ili ne kapablas inteligentigi la reston de Viktorio.*

Se anstataŭ tuj minaci kaj puni, la registaro nur informis pri kiel ricevi vakcinon - kaj komence efektive havus la eblecon vakcini la interesitojn- sen reklami pri tiuj, kiuj rifuzas, laŭ mi la celita elcento de vakcinitoj estus atingita, sen krei dividon kaj hontigon al tiuj, kiuj pensas alimaniere. Bedaŭrinde la premo sentita de tiuj, kiuj ne volas sekvi la rekomendojn de la registaro - mi ne parolas pri la fakuloj , kiuj ne ĉiuj parolas per sama voĉo- instigis al perforto kaj pli firma rifuzo. Tiu fenomo endanĝerigas nian sanon kaj demokratecon . Kelkaj homoj profitas de la malordo . Pensu pri Trump kaj la invado de la ”Capitol”. Ni ne perdu la eblecon interparoli, ricevi eĉ kontraŭdirajn informojn, sincere debati sen antaŭjuĝoj. Mi preferas vivi en mondo , kie unueco en ĉio ne estas celata. *Franciska Toubale*

# Universala baza enspezo (UBI)



Por pli kontentiga kaj sekura mondo

Kio estas la celo de mono se ne por la tuta bonfarto de la homaro

*Roger Springer*

**3ZZZ** Bedaŭrinde mi devas anonci ke pro teknika problemo nur la unua kvarono de la elsendo de la 1a de novembro 2021 aŭdeblas . Krom diversaj anoncoj, la temo estas la danĝero ne permesi esprimon de diversaj opinioj *Franciska Toubale*



"Nacio, kiu timas lasi sian popolon juĝi la veron kaj malveron en malferma merkato, estas nacio, kiu timas sian popolon." *John F. Kennedy*




*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



**SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:**

1). A). Jes, ekzemple "Ili kuris TRE RAPIDE. ("rapide" = determinato, "tre" = epiteto).
B). Jes, ekzemple "Ili ricevos multaJN leterojn".

2). A). Ili ambaŭ estas epitetoj, ĉar en "Ni manĝis la prunojn kuiritaj" "kuiritaj" = "kuiritaj prunoj" .
B), Ne, ĉar oni ne plu scius, kiu estus la propra determinato. *Marcel Leereveld.*




Nur la venkantoj skribas pri la glora historio de milito.



Ĉinoj ne deziras militon. Ili tre fieras siajn belajn urbojn kaj sian belan solan infanon *Roger S*

## Kvankam la usona mararmeo neis, ke la nuklea reaktoro aŭ propulssistemo de la submarŝipo estis difektitaj.

La detekta aviadilo de nuklea materialo Song aludita estas la WC-135W, kiu estis trovita funkcianta en la Suda Ĉina Maro dimanĉe.
Du pecoj el Global Times, vidu
[US investigation on submarine collision 'untransparent' - Global Times]



*Roger Springer*